

Raportaĵo pri VOJAĜO EN ĈINIO

ekde la 10a ĝis la 30a de majo 2015
kadre de la 67a IFEF kongreso en
Kunming (Yunnan provinco)
(Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj)

Reportage au sujet d'un VOYAGE EN CHINE

du 10 au 30 mai 2015
dans le cadre du 67^{ième} congrès de IFEF à
Kunming (Province du Yunnan)
(Fédération internationale des cheminots espérantistes)

1. SINTEZOJ



Granda Muro
Grande Muraille




Somera Palaco
Palais d'Été



Ĉieltemplo
Temple du ciel



Placo – Place
Tian'anmen



67a IFEF-kongreso
67ième Congrès IFEF

1. SYNTHÈSES



1. SINTEZOJ (*)

1.1. CELOJ DE LA RAPORTO - STRATEGIO RIMEDOJ - KUNLABORANTOJ

1.2. ENKONDUKO - TAKSADO

1.3. ĈINIO

1.3.1 Geografiaj ekonomiaj kaj sociaj informoj

1.3.2 La dinastioj

1.4. LA YUNNAN PROVINCO

1.5. LA RAPORTAĴO

1.5.1. Taglibro de Michèle

1.5.2. La fotoj kaj videoj

1.5.3. Galerio de vizaĝoj

1.6. LA SPEKTAKLOJ

En la « Kolegio »

Dum la ekskursoj.

1.7. ALIAJ RAPORTOJ

(*) Uzu la ligiloj (ruĝkoloraj).

[Teknikaj informoj kaj Kiel uzi la raporton](#)

1. SYNTHÈSES (*)

1.1. BUTS DU RAPPORT - STRATEGIE MOYENS - PARTENAIRES

1.2. INTRODUCTION - APPRECIATION

1.3. LA CHINE

1.3.1 Informations géographiques, économiques et sociales

1.3.2 Les dynasties

1.4. LA PROVINCE DU YUNNAN

1.5. LE REPORTAGE

1.5.1. Le journal de bord de Michèle

1.5.2. Les photos et vidéos

1.5.3. Trombinoscope

1.6. LES SPECTACLES

Au « Kolegio »

Pendant les excursions

1.7. AUTRES RAPPORTS

(*) Utilisez les liens (couleur rouge).

[Informations techniques et Mode d'emploi](#)

1. SINTEZOJ

1.1. CELOJ - STRATEGIO - RIMEDO KUNLABORANTOJ

CELOJ DE ĈI TIU RAPORTO:

Memorigi
tiuj ekceptaj
eventoj.

Konatigi
ilin al esperantistoj
kaj franclingvaj
amikoj.

Oferti
la eblecon trovi iom
de la mirinda etoso,
ne nur al la
ĉeestintoj, sed ankaŭ
al tiuj, kiuj pro
diversaj kialoj ne
povis partopreni.

Vigligi
komunumon de
esperantoparolantaj
amikoj.


**STRATEGIO
KAJ RIMEDO:**
Uzi disponiblajn
dokumentojn

Disponibli ilin
rete.

Pli bone koni
unu la aliajn
per disdono de
informoj.

KUNLABORANTOJ - PARTENAIRE

Fotoj Michèle Villers **Photos**
Videoj Hubert kaj Floral Gabalda **Vidéos**
Raporto kaj Aranĝo - Rapport et mises en
page
Hubert De Meyere



1. SYNTHÈSES

1.1. BUTS - STRATEGIE - MOYENS PARTENAIRES

**BUTS DE CE
RAPPORT :**
Se souvenir
de ces événements
exceptionnels.

Les faire connaître
aux amis
espérantistes et
francophones.

Offrir
la possibilité de
retrouver un peu de la
merveilleuse ambiance
aux participants, mais
aussi à ceux qui, pour
diverses raisons n'ont
pas pu participer.

Dynamiser
une communauté
d'amis espérantistes.

1.2. ENKONDUKO - TAKSADO

ENKONDUKO

La unua celo estis partopreni esperantan aranĝon en Ĉinio.

Ni opinias ke Esperanto ne estas celo sed ĉefe ilo por efike komunikigi la homojn.

La esperanta komunumo estas ankoraŭ relative malgranda sed bone disvastigita en multaj landoj. Partopreni esperantajn aranĝojn ebligas kaj konatigi ĉiam pli da amikoj, lerni pli pri multaj temoj, agrable turismi kaj finfine ĝui la vivon.

Ni opinias ke estis longa vojaĝo por nur du semajnoj.

Ĉar ni neniam vizitis Ĉinion, ni petis nian agentejon, krome la flugoj, prepari unu semajna programon en Pekino.

TAKSADO SEMAJNO EN PEKINO

1.2. INTRODUCTION - APPRÉCIATION

INTRODUCTION

L'objectif initial était simplement de participer à un événement espéranto en Chine.

Nous pensons que l'espéranto n'est pas un but en soi, mais surtout un outil pour communiquer efficacement avec des personnes.

La communauté espérantiste est encore relativement petite mais bien réparties dans de nombreux pays. L'espéranto permet de se faire beaucoup d'amis, et d'en apprendre davantage sur de nombreux sujets, de faire du tourisme agréablement et finalement de profiter de la vie.

Nous avons pensé que c'était un long voyage juste pour deux semaines.

Comme on n'avait jamais visité la Chine, on a demandé à notre agence, en plus des vols, de préparer un programme d'une semaine à Pékin.

APPRÉCIATION SEMAINE À PÉKIN

IFEF67

En 2013, dank'al Jean Ripoche, ni malkovris IFEF en Artigues près Bourdeaux, kaj pro tio ni ne hezitis aliĝi al la itala kongreso en San Benedetto del Tronto. Dum tiu kongreso, la prezento de la ĉina kongreso ankaŭ ege allogis nin kaj ni tuj decidis partopreni. En 2016 IFEF okazos en Bulgario kaj la bulgara teamo konvinkis nin ke certe estos mirinda okazo por malkovri tiun landon kiun ni tute ne ankoraŭ konas.

La organizantoj sukcesis perfekte ekvilibrigi tri ĉefajn celojn.

1. Valorigi la landon per malkovro de la ekstraordinara kultura riĉeco de la lando : vetero, pejzaĝoj, konstruaĵoj, monumentoj, artaĵoj, muziko, varma akcepto de la popolo, ... sen forgesi bongustan manĝaĵon.

IFEF67

En 2013, grâce à Jean Ripoche, nous avons découvert IFEF à Artigues près Bourdeaux, et de ce fait on n'a pas hésité à rejoindre le congrès italien à San Benedetto del Tronto. Lors de ce congrès, la présentation du congrès chinois nous a également très attiré et nous avons immédiatement décidé de participer. En 2016 IFEF aura lieu en Bulgarie et l'équipe bulgare nous a convaincus que ce sera certainement une merveilleuse occasion de découvrir ce pays que nous ne connaissons pas encore.

Les organisateurs ont réussi à équilibrer parfaitement trois objectifs majeurs.

1. Valoriser le pays par la découverte de sa richesse culturelle extraordinaire : paysages, bâtiments, monuments, œuvres d'art, musique. A souligner aussi, la météo favorable, l'accueil chaleureux du peuple, et une excellente cuisine.

2. Trakti la programitajn fervojajn kongresaferojn.

Kvankam ni ne estas fervojistoj la fakprelegoj ege interesis nin. Interalie la « fervojaj novaĵoj » kiuj oferis la eblecon pli bone koni partoprenantojn el multaj landoj.

3. Uzi Esperanton kiel komuna lingvo. ĝi perfekte ludis sian rolon, sed « restis al sia ĝusta pozicio : « ilo kaj ne celo ».

Ni malkovris la lingvon en 2004 kaj tre ĝojas, ke kvankam ni ankaŭ faras multajn lingvajn erarojn, ni facile sekvis ĉion en Esperanto. Ni kuraĝigu la komencantojn.

2. Traiter les sujets prévus concernant les chemins de fer.

Bien que nous ne sommes cheminots, les conférences professionnelles nous ont très intéressés. Entre autres choses, « les nouvelles du chemin de fer » qui nous ont donné la possibilité de mieux connaître les participants de nombreux pays.

3. Utiliser l'espéranto comme langue commun. Il a parfaitement joué son rôle, tout en restant à sa juste place : un outil et non un but en soi.

Nous avons découvert cette langue en 2004 et sommes très heureux que, même si nous faisons encore beaucoup de fautes de langue, nous avons facilement suivi tous les exposés, et participé aux conversations. Encourageons les débutants!

Tri laborismaj
organizintoj de
la kongreso.

DUAN
Yongîng,
prezidanto de
la LKK.
Du vic-
prezidantoj.



DUAN Yongîng

Trois chevilles
ouvrières du
congrès.

DUAN
Yongîng,
Président du
comité local et
deux vice-
présidents.



HAN
Zuwu



WANG
Minhao PgDn

Ni aparte
dankas DUAN
Yongîng:
Esperantisto,
direktoro de
La Profesia
Artakolegio de
Kunming,
Prezidento de
la Lokala
Kongreso
Komitato (LKK).




Nous remercions
particulièrement
DUAN Yongîng :
espérantiste,
directeur du
« Professional
Artakolegio de
Kunming » et
Président du
comité
d'organisation
local.

Li mobilizis por la Kongreso
la rimedojn de sia kolegio :
profesiaj multmediaj
rimedoj, lokoj, instruistoj
kaj lernantoj.

Il a mobilisé pour le Congrès les
ressources de son collège: moyens
multimédias professionnels, les sites,
les enseignants et les étudiants.

Les 56 pages de la brochure du congrès ont aussi été très utiles pour préparer ce document. Voici les photos des couvertures et la table des matières

La 56 paĝa kongreslibro ankaŭ tre utilis por prepari tiun dokumenton. Jen fotoj de la koveto kaj la ENHAVTABELO.



Paĝo Enhavo

1. Honora komitato
6. Loka Komitato kaj volontuloj
28. Utilaj informoj
30. Programo
32. Esperanto - Asocio
36. Fervojo en Ĉinio
40. Ekskursoj
48. Listo de kongresanoj
55. IFEF-kongresoj de la 1-a ĝis la 67-a

Page Contenu

1. Comité d'honneur
6. Comité local et volontaires
28. Informations utiles
30. Programme
32. Association espéranto
36. Le chemin de fer en Chine
40. Excursions
48. Liste des congressistes
55. Congrès IFEF du 1^{er} au 67^{ième}



République populaire de Chine

中华人民共和国 (zh)

中華人民共和國 (zh-TW)

Zhōnghuá Rénmín
Gònghéguó (zh)



Drapeau de la République populaire de Chine



Emblème de la République populaire de Chine



Hymne national *La Marche des Volontaires*

1.3. LA CHINE - ĈINIO

1.3.1. INFORMATIONS GÉOGRAPHIQUES, ÉCONOMIQUES ET SOCIALES GEOGRAFIJAJ EKONOMIAJ KAJ SOCIAJ INFORMOJ

Administration

Forme de l'État	République État communiste à parti unique
Revendiqué par	République de Chine
Secrétaire général du PCC	Xi Jinping
Président	Xi Jinping
Premier ministre	Li Keqiang
Président de l'ANP	Zhang Dejiang
Président de la CCPPC	Yu Zhengsheng
Langues officielles	Chinois mandarin ^{Note 1}
Capitale	Pékin 39° 55' N, 116° 23' E

Géographie

Ville la plus peuplée	Shanghai
Superficie totale	9 596 961 km ² (classé 3/4 ^e)
Superficie en eau	2,85 %
Fuseau horaire	UTC +8
Histoire	
Indépendance	Antiquité ^{Note 2}
Guerre civile chinoise	Déclarée le 1 ^{er} octobre 1949

Démographie

Gentilé	Chinois(e)
Population totale (2012)	1 350 695 000 ¹ hab. (classé 1 ^e)
Densité	141 hab./km ²

Économie

PIB nominal (2014)	10 028 milliards \$ (2 ^e)
PIB (PPA) (2014)	17 632 milliards \$ ² (1 ^{er})
PIB nominal par hab. (2014)	7 548 \$ (83 ^e)
PIB (PPA) par hab. (2014)	10 695 \$ (82 ^e)
IDH (2013)	▲ 0,719 ^{Note 3} (élevé) (91 ^e)
Monnaie	yuan ou renminbi (CNY)

Ĉinio (*ĉine*: 中国 *pinjine*: Zhōngguó = "la Meza Reĝlando"), oficiala nomo **Ĉina Popola Respubliko** (*ĉine*: 中华人民共和国 *pinjine*: Zhōnghuá rénmin gònghéguó) estas lando en orienta **Azio** kaj la plej multthoma nacio en la **mondo**. Ĝi estas unupartia **socialisma** ŝtato regita de la **Komunisma Partio de Ĉinio**, la tria aŭ kvara plej granda lando laŭ areo, kaj havas treege diversajn geografion kaj kulturon. Ekde la enkonduko de kapitalisma ekonomio en 1978, Ĉinio fariĝis ĉefrolanto en mondkomerco, kaj certe fariĝos monda superpotenco.

Chine (en **chinois**: 中国 *pinyin*: Zhōngguó = « Etat du milieu»), le nom officiel de République populaire de Chine (en **chinois**: 中华人民共和国 *pinyin*: Zhonghua Renmin Gongheguo) est un pays d'Asie de l'Est et la nation la plus peuplée du monde. Il est un état socialiste à parti unique régie par le Parti communiste de Chine, le troisième ou quatrième plus grand pays dans la région, et a une géographie et une culture très diversifiée. Depuis l'introduction d'une économie capitaliste en 1978, la Chine est un acteur clé dans le commerce mondial, et certainement va devenir une superpuissance mondiale.

1.3.2. KRONOLOGIO DE LA DINASTIOJ - CHRONOLOGIE DES DYNASTIES			Liens - Ligiloj	Années - jaroj Durée - daŭro	
<u>Période des Trois Augustes et des Cinq Empereurs</u>	三皇五帝	sān huáng wǔ dì	(<u>H</u> - <u>E</u>)	avant <u>2070 av.J.-C.</u>	628+
<u>Dynastie Xia</u>	夏	xià	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>2100 - 1600</u>	500
<u>Dynastie Shang</u>	商	shāng	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>1600 - 1046</u>	554
<u>Dynastie des Zhou occidentaux</u>	西周	xī zhōu	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>1046 - 771</u>	275
<u>Dynastie des Zhou orientaux</u>	東周	dōng zhōu	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>770 - 256</u>	514
Traditionnellement divisée en					
<u>Période des Printemps et des Automnes</u>	春秋	chūn qiū	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>722 - 476</u>	246
<u>Période des Royaumes combattants</u>	戰國	zhàn guó	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>475 - 221</u>	254
<u>Dynastie Qin</u>	秦	qín	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>221 - 206</u>	15
<u>Dynastie des Han occidentaux</u>	西漢	xī hàn	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>206 av. J.-C. - 9 ap. J.-C.</u>	215
<u>Dynastie Xin</u>	新	xīn	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>9 - 26</u>	15
<u>Dynastie des Han orientaux</u>	東漢	dōng hàn	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>25 - 220</u>	195
<u>Trois Royaumes de Chine</u> (san guo)	三國	sān guó	(<u>H</u> - <u>Wei</u> - <u>Wu</u> - <u>Shu</u>)	<u>220 - 265</u>	45
<u>Dynastie des Jin occidentaux</u>	西晉	xī jìn	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>265 - 317</u>	52
<u>Dynastie des Jin orientaux</u>	東晉	dōng jìn	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>317 - 420</u>	103
<u>Dynasties du Nord et du Sud</u>	南北朝	nán běi cháo	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>420 - 581</u>	161
<u>Dynastie Sui</u>	隋	suí	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>581 - 618</u>	37
<u>Dynastie Tang</u>	唐	táng	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>618 - 907</u>	289
<u>Période des Cinq Dynasties et des Dix Royaumes</u>	五代十國	wǔ dài shí guó	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>907 - 960</u>	53
<u>Dynastie des Song du Nord</u>	北宋	běi sòng	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>960 - 1127</u>	167
<u>Dynastie des Song du Sud</u>	南宋	nán sòng	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>1127 - 1279</u>	152
<u>Dynastie Liao</u>	遼	liáo	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>916 - 1125</u>	209
<u>Dynastie Jin</u>	金	jīn	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>1115 - 1234</u>	119
<u>Dynastie Yuan</u>	元	yuán	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>1271 - 1368</u>	97
<u>Dynastie Ming</u>	明	míng	(<u>H</u> - <u>E</u>)	<u>1368 - 1644</u>	276




Yunnan à l'intérieur de la Chine

3

Junano (ĉine: 云南, Pinjine: Yúnnán) estas provinco, kiu situas ĉe la sudokcidenta landlimo de Ĉinio. La norda tropiko trapasas ĝian sudon. Kun totala areo de 394 mil kvadrataj kilometroj, ĝi konsistigas 4.1% de la areo de Ĉinio.

<http://www.yn.gov.cn/>



Administration	
Pays	 Chine
Autres noms	Chinois : 云南 Pinyin : Yúnnán « Sud des nuages »
Abréviation	滇 (diān), 云 (yún)
Statut politique	Province
Capitale	Kunming
Démographie	
Population	45 966 239 hab. (2010)
Densité	117 hab./km ²
Rang	12 ^e
Nationalités	Hans (67 %) Yi (11 %) Bai (3,6 %) Hani (3,4 %) Zhuang (2,7 %) Dai (2,7 %) Hmong (2,5 %) Hui (1,5 %) Blang (0,2 %) Achang (0,1 %)
Géographie	
Superficie	393 734 km ²
Rang	8 ^e
Économie	
PIB (2006)	400 000 M¥ (23 ^e)
PIB/hab.	8 702 ¥ (29 ^e)

1.4. LA PROVINCE DU YUNNAN

Le **Yunnan** (chinois simplifié : 云南 ; chinois traditionnel : 雲南 ; pinyin : Yúnnán ; littéralement : « Sud des nuages ») est une province du sud-ouest de la Chine. Frontalier du Viêt Nam, du Laos et de la Birmanie, il regroupe des populations de diverses appartenances ethniques (25 minorités nationales).

Région essentiellement montagneuse, le Yunnan reste peu avancé sur le plan économique, malgré le développement du tourisme.

1.4. YUNNAN PROVINCO

Junano (simpligita ĉina: 云南; tradicia ĉino: 雲南; pinjine: Yunnan; laŭvorte "sude de la nuboj") estas sudokcidenta provinco de Ĉinio. Limo de Vjetnamio, Laoso kaj Birmo, ĝi kunvenas personoj de diversaj etnoj (25 naciaj malplimultoj).

Ĉefe monta regiono, Yunnan estas malmulta progreso en la ekonomia fronto, malgraŭ la disvolviĝo de turismo.

LES ETHNIES DU YUNNAN



La Chine est peuplée officiellement de 1.332.000.000 d'habitants (recensement 2012) en majorité de l'ethnie Han (91,6%). Mais près des frontières vivent aussi de nombreuses ethnies d'origine, culture, langue et tradition différentes (55 dans toute la Chine).

25 minorités ethniques vivent dans le Yunnan (26 ethnies avec les Han).

Les Yi sont les plus importants (4 millions). Viennent ensuite les Bai (1,5), Hani (1,4), Zhuang (1), Dai (1), Miao (1), Hui (500 000), Lisu (500 000), Lahu (400 000), Wa (300 000), Naxi (280 000), Yao (180 000), Tibétains (100 000), Bulang (80 000), Buyi (35 000), et d'autres beaucoup moins nombreux (Dulong (7 000), Achang (27 000), Moso (30 000), Shui (7 000), De'ang (17 000), Nu (25 000), Mongols (13 000).

Et n'oublions pas les Han qui sont en maints endroits minoritaires et bien éloignés par leurs traditions de leurs frères du nord.

Pour plus de détails consultez le site ci-dessous (en français). Je reprends quelques informations concernant les ethnies que nous avons visitées pendant IFEF67.

La Chine est peuplée officiellement de 1.332.000.000 d'habitants (recensement 2012) en majorité de l'ethnie Han (91,6%). Mais près des frontières vivent aussi de nombreuses ethnies d'origine, culture, langue et tradition différentes (55 dans toute la Chine).

25 minorités ethniques vivent dans le Yunnan (26 ethnies avec les Han).

Les Yi sont les plus importants (4 millions). Viennent ensuite les Bai (1,5), Hani (1,4), Zhuang (1), Dai (1), Miao (1), Hui (500 000), Lisu (500 000), Lahu (400 000), Wa (300 000), Naxi (280 000), Yao (180 000), Tibétains (100 000), Bulang (80 000), Buyi (35 000), et d'autres beaucoup moins nombreux (Dulong (7 000), Achang (27 000), Moso (30 000), Shui (7 000), De'ang (17 000), Nu (25 000), Mongols (13 000).

Et n'oublions pas les Han qui sont en maints endroits minoritaires et bien éloignés par leurs traditions de leurs frères du nord.

Pour plus de détails consultez le site ci-dessous (en français). Je reprends quelques informations concernant les ethnies que nous avons visitées pendant IFEF67.

Les Yi

Très nombreux villages partout dans le Yunnan avec de nombreux sous-groupes très différents les uns des autres.



Les Yi

Très nombreux villages partout dans le Yunnan avec de nombreux sous-groupes très différents les uns des autres.

Les Bai

Ils habitent une zone étendue autour de Dali, ont une forte culture traditionnelle.



Les Bai

Ils habitent une zone étendue autour de Dali, ont une forte culture traditionnelle.

Les Naxi

Ils vivent dans la région de Lijiang. Forte culture ancienne (culture Dongba); ils ont un costume caractéristique.



Les Naxi

Ils vivent dans la région de Lijiang. Forte culture ancienne (culture Dongba); ils ont un costume caractéristique.



Yi



Yi



Yi



Bai



Bai



Bai



Naxi



Naxi



Naxi



Naxi

[Sintezoj/synthèses](#)



PgDn

1.5. LE REPORTAGE

La taglibro de Michèle kaj kronologie ordigitaj dosieroj de fotoj kaj videoj gvidis la raportado.

1.5.1. LA LOGLIBRO DE MICHÈLE

Michèle havis la bonan ideon konservi manskribitan taglibron en kiu ŝi tage resumis la ĉefaj okazaĵoj de la tago.

1.5.2. LA FOTOJ KAJ VIDEOJ

La kameskopo aĉetita kelkajn tagojn antaŭ foriro kondukis al miaj unuaj spertoj kiel "amatora filmisto" enmetante kaj la sonoj kaj la movadoj.

Tiuj videoj estas valora komplemento por ilustrati la bildoprezento kiun mi kutimas plenumi ekde la lastaj jaroj. Do ne temas pri filmoj sed pri bildoprezento riĉigita per filmetoj.

La dosieroj estis stokitaj ĉiutage sur ekstera malmola disko konektebla al mia « Microsoft Surface »-tableto.

1.5.3. TROMBINOSCOPE

Depuis quelques années j'illustre mes rapports par un tableau des participants avec leur photo. Pour IFEF67 il figure dans

1.5. LE REPORTAGE

Le journal de bord de Michèle et des fichiers de photos et de vidéos, classés chronologiquement, ont servi de guide pour l'élaboration du reportage.

1.5.1. LE JOURNAL DE BORD DE MICHÈLE

Michèle a eu la bonne idée de tenir un journal de bord manuscrit dans lequel elle a résumé chaque jour les principaux événements du jour.

1.5.2. LES PHOTOS ET VIDÉOS

Le caméscope acheté quelques jours avant le départ a permis de faire mes premières armes comme « cinéaste amateur » en saisissant à la fois les sons et les mouvements.

Ces vidéos sont un complément appréciable pour illustrer le diaporama que j'ai l'habitude de réaliser ces dernières années. Il ne s'agit donc pas d'un film mais bien d'un diaporama enrichi de vidéos.

Les fichiers ont été mémorisés au jour le jour sur un disque dur externe connectable à ma tablette Microsoft SURFACE.

1.5.3. TROMBINOSCOPE

Depuis quelques années j'illustre mes rapports par un tableau des participants avec leur photo. Pour IFEF67 il figure dans :

1.6. LA SPEKTAKLOJ

Ŝlosila trajto de ĉi tiu kongreso estas la tre granda kvanto kaj alta kvalito de la spektakloj.

La fakto ke la LKK prezidanto estas direktoro de PAK (Profesia Artokolegio de Kunming) multe ludis pri la sukceso, sed ankaŭ la devontigo de la tuta LKK kaj de la personaro de PAK. Dankon al ĉiuj. [Alklaku](#)

EN LA « KOLEGIO »

Ĉiujn vesperojn, buso transportis nin al la PAK kaj reen al Fubao. Ĉiu servo daŭris du horojn, kaj ni ĉiam estis reen je la 22-a; tiu estas aprezata post laciga tago.

Dum la kvar sesioj okazis 53 majstraj artaj servoj, prezentitaj en Esperanto kaj en la ĉina lingvo: dancoj, kantoj kaj atletaj demonstracioj de profesia nivelo.

DUM LA EKSURSOJ.

Ni havis la ŝancon ĉeesti lokaj servoj.

La spektakloj estas ilustritaj en la raportoj pri la kongreso kaj la postkongreso.

1.6. LES SPECTACLES

Une caractéristique essentielle de ce congrès est le très grand nombre et la très grande qualité des spectacles.

Le fait que le président du LKK est le directeur du PAK (Profesia Artokolegio de Kunming) est certainement pour beaucoup dans le succès, mais aussi l'engagement de tout le LKK et du personnel du PAK. Merci à tous. [Cliquer](#)

AU « COLEGIO »

Pour ces soirées, un bus nous a véhiculé vers le PAK et ramenés à FUBAO. Chaque soirée a duré deux heures, et on a toujours été rentrés pour 22 heures, ce qui est appréciable après une journée bien remplie.

Pendant les quatre séances il y a eu 53 prestations artistiques magistrales, présentées en Espéranto et en langue chinoises : danses, chants et démonstrations athlétiques de niveau professionnel.

PENDANT LES EXCURSIONS

On a eu l'occasion d'assister à des prestations locales.

Les spectacles sont illustrés dans les rapports sur le congrès et l'après-congrès.

http://www.hubertdemeyere.com/2015_05_V7_IFEF67_KONGRESO.pdf
http://www.hubertdemeyere.com/2015_05_V3_IFEF67_POSTKONGRESO.pdf

1.7. ALIAJ RAPORTOJ - AUTRES RAPPORTS

Ni provizas ligilojn por aliri raportojn verkitajn de aliaj amikoj, ĉefe pri la ekskursoj, la vesperaranĝoj kaj la prelegoj.

Nous fournissons des liens pour accéder à des rapports écrits par d'autres amis, en particulier sur les excursions, les programmes en soirée et les conférences.



Fotoj de la fervoja muzeo en Kunming, faka vizito dum la IFEF kongreso.

Photos du musée du chemin de fer à Kunming, les visites de spécialité pendant le congrès IFEF.



<http://www.ipernity.com/doc/68288/album/799368>

Vito Tornillo
Bruno Henry

Mesaĝo de Laurent Vignau kun ligilo al bela fotoj albumo Karaj,

Jen fotoj pri la IFEF-kongreso (kaj ĉina kongreso) en lasta majo en Kunming.

<http://ifef.free.fr/kunming2015>

Al vi mi sendas ĉar vi estas videbla(j) sur unu aŭ pluraj fotoj. Re-dankegon al niaj ĉinaj amikoj pro tiu belega kongreso.

ĝis revido en Esperantio !

Kore, Laurent





Raporto de Liba Gabalda
Bonega sintezo de la aranĝo
← **Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda**

La 67-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO
16 - 23 majo 2015

La ĉi-jara IFEF-kongreso okazis samtempe kun la 11-a ĉina E-kongreso, kiu daŭris nur tri tagojn. Ĝi okazis en la urbo Kunming nomata la urbo de eterna printempo. La temperaturo superis 30°C dum nia kongresa semajno.

Kunming situas en bela parto de la provinco Yunnan en sudokcidenta Ĉinio. Ni restadis rando de la urbo en agrabla hotel- kaj kultur-komplekso Fubao, kie okazis ambaŭ kongresoj.

Krom multaj ĉinaj partoprenantoj al la evento aliĝis 42 geesperantistoj el Eŭropo. Jam en la flughaveno bonvenigis nin “freŝbakitaj esperantistoj”. Ili estis volontuloj el studentoj de la Profesia Artkolegio de Kunming. En ĉiuj okazaĵoj ili estis pretaj saluti nin denove. Dum la interkona vespero ĉinaj esperantistoj preparis muzikan programon.

La dimanĉa inaŭguro estis impona. Ĉe la enirejo de la salono ambaŭflanke vice staris belaj junulinoj vestitaj en buntaj kaj elegantaj etnaj kostumoj. Sur la podio sidis ĉinaj reprezentantoj kaj gravuloj de la E-movado. Inter ili la prezidantino de IFEF Rodica Todor, la sekretario Vito Tornillo kaj la honora prezidanto Romano Bolognesi, la du lastaj el Italio. Post la festparoladoj oni realigis komunan fotadon antaŭ la akceptejo.

Agrabla estis muzika prezento per tradiciaj ĉinaj instrumentoj. Post tio, sekvis salutado de reprezentantoj de diversaj landaj sekcioj de IFEF kaj aliaj asocioj. **Ĉe la fino, post la malfermo de la kongresoj, gestudentoj de la Profesia Artkolegio bravvoĉe kantis la E-himnon “La Espero”.**

Posttagmeze jam komenciĝis serioza programo.

Ĉinoj prezentis surekrane retpaĝojn de “El Popola Ĉinio” kaj de la Ĉina Radio Internacia (ĈRI) ni povis aŭskulti partojn de la programo kaj spekti kelkajn filmetojn, kiuj gajnis la konkurson de la filmfestivalo “Teo kaj Amo”. Posttagmeze okazis E-kurso gvidata de s-ino Luigia Oberrauch Madella el Italio.

La temo de la fervojista kongreso estis: “Esperanto kunligu la landojn laŭ la nova Silka Vojo”.

Oni menciis la fakton, ke la unua internacia fervojlinio de Ĉinio ekiris de Kunming ĝis Vjetnamio en la jaro 1910. Okazis kelkaj fakprelegoj, gazetara konferenco, oni parolis pri movadaj aferoj kaj fervojaj novaĵoj. Bruno Henry parolis pri sia vojaĝado en Irano, Liu Jun prelegis pri la svisa fervojo, Ladislav Hakl pri la vartrafiko en Eŭropo kaj Azio. Gastoj el Bulgario prezentis la venontan IFEF-kongreson okazontan apud la urbo Varna ĉe la Nigra maro. Ĉe la fino de la kongreso oni transdonis al ili Esperanto-flagon.

Ege interesaj kaj emociplenaj estis ĉiuvesperaj kulturaj programeroj kaj altnivelaj artaj spektakloj fare de junaj gestudentoj kaj profesoroj de la Profesia Artkolegio, kies direktoro s-ro Duan Yongxing estas esperantisto kaj samtempe la prezidanto de la LKK. Ni spektis diversajn dancojn, kantojn kaj ĥorkantadon, muzikaĵojn kaj akrobataĵojn. En tiuj spektakloj oni nur malfacile povas superi la ĉinan talenton. Ĉio estis vere altkvalite prezentita kaj la kantotekstojn tradukitajn al Esperanto ni povis legi surekrane. Ni estis ravitaj pri ĉiuj riĉaj programeroj. Ili restos longtempe en memoro de ĉiuj partoprenantoj.

Alia rimarkinda afero estis la manĝo. Rondaj tabloj pleniĝis per specialaj ĉinaj pladoj, parte tre spicitaj. En la memserva manĝejo estis elekto el pli ol kvindek pladoj. Abundo da ĉiuspecaj legomoj, viandaĵoj, ovaĵoj, fiŝaĵoj, vaporumitaj farĉitaj farunbuloj, diversaj saŭcoj, supoj, kuketoj, akvomelono kaj kompreneble ne mankis rizo trifoje tage. Ĉiutage ni povis gustumi ion novan. La manĝoj ofte estis tro spicitaj, tro pikaj. Tamen ĉio estis tre bongusta. Ĉinoj kutime trinkas akvon, teon aŭ rizakvon. Dum la bankedo ni gustumis fortan brandon. Se oni deziris trinki kafon oni devis ĝin aĉeti en vendejo kaj mem pretigi.

Dum la IFEF-semajno ni ekskursis al Xishan monto (Okcidenta monto). Per telfero ni supreniris ĝin kaj de tie ni piede malsupreniris admirante belajn pejzaĝojn, diversajn pavilonojn, ornamitajn ŝtuparojn, religiajn altarojn, kavojn, rokarojn kaj la lagon Dianchi. Dum alia duontaga ekskurso ni vizitis fervojmuzeon de Yunnan. Ĝi estis konstruita en la jaro 1990 ĉe la norda fervojstacio. Ni vidis multajn eksponaĵojn de la objektoj bezonatajn ĉe la fervojo kaj historiajn fotojn, dokumentojn pri konstrufazoj de la fervojo, mapojn, uniformojn, trajnmodelojn ktp. En la lokomotiva halo nin impresis diversaj lokomotivoj, ĉe kiuj ni grupe fotiĝis. La muzeo donas superrigardon pri la disvolviĝo de fervojo en la provinco Yunnan.

Poste ni ĝuis promenon en la parko de Cuihu lago (Verda lago). Ĝi estas tre animita. Tie kelkaj personoj ekzercas dancadon kaj aliaj spontanee kantadon. Iuj ripozas ĉe lotusplena lageto, aŭ ludas ĉinan tabloludon, aliaj aĉetumas aŭ rigardas budojn plenajn je memoraĵoj, vestaĵoj, manĝaĵoj. Admirindaj estas diversaj pavilonoj, pontetoj, insuletoj kaj bambuaro. Bedaŭrinde ne estis sufiĉe da tempo por trairi kaj malkovri la tutan 24-hektaran parkon.

La tuttaga ekskurso gvidis nin al la Ŝtona arbaro. Ĝi situas je 85 km for de la urbo Kunming. Survojaj laboroj malrapidigis nian busvojaĝon. Dume ni povis admiri variajn pejzaĝojn, malgrandajn vilaĝetojn, konstantan domkonstruadon kaj vastajn rizkampojn prilaboratajn de kamparanoj kun tipaj konusaj ĉapeloj.

La Ŝtonarbaro vere impresis. Ni promenis inter rokaroj, ĉirkaŭ lagoj kaj diversformaj kaj koloraj ŝtonegoj. Laŭ fantazio oni povas en ili imagi diversajn figurojn kaj estaĵojn. Florantaj kampoj, ŝvebantaj papilioj, plurkoloraj arbustoj kaj tropikaj floroj alvokas fortan impreson pri la beleco de tiu paradiza loko.

Interesa estis ankaŭ la loka bazaro, kie oni vendis ion ajn, bezonatan kaj nebezonatan. Allogaj estis tropikaj legomoj kaj fruktoj. Malpli allogis kokin- kaj porkpiedoj, pork-oreloj kaj muzeloj, vivaj bufoj kaj serpentoj atendantaj aĉetontojn por la konsumado. Ne mankis ŝamanaj medicinaĵoj.

La lasta vespermanĝo estis pli festa kaj la adiaŭa programo okazis denove en la halo de la Profesia Artkolegio kun bunta programo. Kelkaj elstaraj personoj ĉiam post la prezentitaj spektakloj persone dankis kaj manpremis kun la aktoroj.

Dum la tuta semajno ni ĝuegis riĉan kulturalan programon kaj ĉinan afablecon. Koran dankon al la organizantoj pro la etosoplana kongreso!





**IFEF67 en Ĉinio - RAPORTO DE LIBA GABALDA
Nova aranĝo de la raporto.
Faris Hubert De Meyere per intensa uzo de ligiloj.**

PROBLEMO

Evidente, Liba elektis bildojn kiuj ilustras la diversaj paragrafojn de la raporto. Tamen ne estas facile fari la rilaton inter la bildoj kaj la teksto. Plue, post la legado de la tuta raporto, oni ne facile retrovas la paragrafon pri iu temo aŭ bildo.

SOLVO

La modernaj komputilaj iloj provizas la rimedojn por superi tiun malfacilaĵon, ĉefe per ligiloj.

REZULTO

Simple alklaku iun bildon, kaj aŭtomate vi ricevos la paĝon en kiu troviĝas la rilatitan parton de la raporto. La fizika sensekvo de la teksto ne ŝanĝis. La aspekton de la kompleta bildpaĝo ne ŝanĝis.

**NUN ĈIU KAPABLAS LEGI LA DOKUMENTON
LAŬ ORDO ANTAŬVIDITA DE LA VERKISTO,
SED ANKAŬ LAŬ SIA PROPRA LOGIKO,
GVIDITA PER LA BILDOJ.**

KION MI FARIS

Mi simple partigis la tekston en pluraj paĝojn kaj kolektis sur ĉiu paĝo la rilatatajn bildojn.

Mi partigis la kompletan bildpaĝon tiel maniere ke ĉiu bildo estu sendepende alirebla. Sur ĉiu bildo mi metis ligan al la rilatata paĝo de la teksto kun bildo.

Malsupren de ĉiu paĝo mi provizis ligan (ruĝkolora sagon) per kiu oni realiras la kompletan bildpaĝon.

La 67-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO 16 - 23 majo 2015

La ĉi-jara IFEF-kongreso okazis samtempe kun la 11-a ĉina E-kongreso, kiu daŭris nur tri tagojn.

Ĝi okazis en la urbo Kunming nomata la urbo de eterna printempo. La temperaturo superis 30°C dum nia kongresa semajno.

Kunming situas en bela parto de la provinco Yunnan en sudokcidenta Ĉinio.

Ni restadis rande de la urbo en agrabla hotel- kaj kultur-komplekso Fubao, kie okazis ambaŭ kongresoj.

Krom multaj ĉinaj partoprenantoj al la evento aliĝis 42 geesperantistoj el Eŭropo.

Jam en la flughaveno bonvenigis nin "freŝbakitaj esperantistoj". Ili estis volontuloj el studentoj de la Profesia Artkolegio de Kunming. En ĉiuj okazaĵoj ili estis pretaj saluti nin denove. Dum la interkona vespero ĉinaj esperantistoj preparis muzikan programon.

La dimanĉa inaŭguro estis impona.



Ĉe la enirejo de la salono ambaŭflanke vice staris **belaj junulinoj** vestitaj en buntaj kaj elegantaj etnaj kostumoj.

Sur la podio sidis ĉinaj reprezentantoj kaj gravuloj de la E-movado.

Inter ili la prezidantino de IFEF Rodica Todor, la sekretario Vito Tornillo kaj la honora prezidanto Romano Bolognesi, la du lastaj el Italio.

Post la festparoladoj oni realigis **komunan fotadon** antaŭ la akceptejo.



**Agrabla estis
muzika prezento
per
tradiciaj ĉinaj
instrumentoj.**



Post tio, sekvis salutado de reprezentantoj de diversaj landaj sekcioj de IFEF kaj aliaj asocioj. Ĉe la fino, post la malfermo de la kongreso, gestudentoj de la Profesia Artkolegio bravocĉe kantis la E-himnon "La Espero".

Posttagmeze jam komenciĝis serioza programo.

Ĉinoj prezentis surekrane retpaĝojn de "El Popola Ĉinio" kaj de la Ĉina Radio Internacia (ĈRI) ni povis aŭskulti partojn de la programo kaj spekti kelkajn filmetojn, kiuj gajnis la konkurson de la filmfestivalo "Teo kaj Amo". Posttagmeze okazis E-kurso gvidata de sino Luigia Oberrauch Madella el Italio.



La temo de la fervojista kongreso estis: "Esperanto kunligu la landojn laŭ la nova Silka Vojo".

Oni menciis la fakton, ke la unua internacia fervojlinio de Ĉinio ekiris de Kunming ĝis Vjetnamio en la jaro 1910. Okazis kelkaj fakprelegoj, gazetara konferenco, oni parolis pri movadaj aferoj kaj fervojaj novaĵoj. Bruno Henry parolis pri sia vojaĝado en Irano, Liu Jun prelegis pri la svisa fervojo, Ladislav Haki pri la vartrafiko en Eŭropo kaj Azio.



**Gastoj el Bulgario prezentis la
venontan IFEF-kongreson okazontan
apud la urbo Varna ĉe la Nigra
maro. Ĉe la fino de la kongreso oni
transdonis al ili Esperanto-flagon.**



Ege interesaj kaj emociplenaj estis ĉiuvesperaj kulturaj programeroj kaj altnivelaj artaj spektakloj fare de junaj gestudentoj kaj profesoroj de la Profesia Artkolegio, kies direktoro s-ro Duan Yongxing estas esperantisto kaj samtempe la prezidanto de la LKK.

Ni spektis diversajn dancojn, kantojn kaj ĥorkantadon, muzikaĵojn kaj akrobataĵojn. En tiuj spektakloj oni nur malfacile povas superi la ĉinan talenton. Ĉio estis vere altkvalite prezentita kaj la kantotekstojn tradukitajn al Esperanto ni povis legi surekrane. Ni estis ravitaj pri ĉiuj riĉaj programeroj. Ili restos longtempe en memoro de ĉiuj partoprenantoj.

Alia rimarkinda afero estis la manĝo.

Rondaj tabloj pleniĝis per specialaj ĉinaj pladoj, parte tre spicitaj. En la memserva manĝejo estis elekto el pli ol kvindek pladoj. Abundo da ĉiuspecaj legomoj, viandaĵoj, ovaĵoj, fiŝaĵoj, vaporumitaj farĉitaj farunbuloj, diversaj saŭcoj, supoj, kuketoj, akvomelono kaj kompreneble ne mankis rizo trifoje tage.

Ĉiutage ni povis gustumi ion novan.

La manĝoj ofte estis tro spicitaj, tro pikaj. Tamen ĉio estis tre bongusta. Ĉinoj kutime trinkas akvon, teon aŭ rizakvon. Dum la bankedo ni gustumis fortan brandon. Se oni deziris trinki kafon oni devis ĝin aĉeti en vendejo kaj mem pretigi.





Dum la IFEF-semajno ni ekskursis al Xishan monto (Okcidenta monto).

Per telfero ni supreniris ĝin kaj de tie ni piede malsupreniris admirante belajn pejzaĝojn, diversajn pavilonojn, ornamitajn ŝtuparojn, religiajn altarojn, kavojn, rokarojn kaj la lagon Dianchi.



Dum alia duontaga ekskurso ni vizitis fervojmuzeon de Yunnan. Ĝi estis konstruita en la jaro 1990 ĉe la norda fervojstacio. Ni vidis multajn eksponaĵojn de la objektoj bezonatajn ĉe la fervojo kaj historiajn fotojn, dokumentojn pri konstrufazoj de la fervojo, mapojn, uniformojn, trajnmodelojn ktp. En la lokomotiva halo nin impresis diversaj lokomotivoj, ĉe kiuj ni grupe fotiĝis. La muzeo donas superrigardon pri la disvolviĝo de fervojo en la provinco Yunnan.



Poste ni ĝuis promenon en la parko de Cuihu lago (Verda lago).

Ĝi estas tre animita. Tie kelkaj personoj ekzercas dancadon kaj aliaj spontanee kantadon. Iuj ripozas ĉe lotusplena lageto, aŭ ludas ĉinan tabloludon, aliaj aĉetumas aŭ rigardas budojn plenajn je memoraĵoj, vestaĵoj, manĝaĵoj. Admirindaj estas diversaj pavilonoj, pontetoj, insuletoj kaj bambuaro. Bedaŭrinde ne estis sufiĉe da tempo por trairi kaj malkovri la tutan 24-hektaran parkon.



La tuttaga ekskurso gvidis nin al la Ŝtona arbaro.

Ĝi situas je 85 km for de la urbo Kunming. Survojaj laboroj malrapidigis nian busvojaĝon. Dume ni povis admiri variajn pejzaĝojn, malgrandajn vilaĝetojn, konstantan domkonstruadon kaj vastajn rizkampojn prilaboratajn de kamparanoj kun tipaj konusaj ĉapeloj.

La Ŝtonarbaro vere impresis.

Ni promenis inter rokaroj, ĉirkaŭ lagetoj kaj diversformaj kaj koloraj ŝtonegoj. Laŭ fantazio oni povas en ili imagi diversajn figurojn kaj estaĵojn. Florantaj kampoj, ŝvebantaj papilioj, plurkoloraj arbustoj kaj tropikaj floroj alvokas fortan impreson pri la beleco de tiu paradiza loko.

Interesa estis ankaŭ la loka bazaro, kie oni vendis ion ajn, bezonatan kaj nebezonatan.

Allogaj estis tropikaj legomoj kaj fruktoj. Malpli allogis kokin- kaj porkpiedoj, pork-oreloj kaj muzeloj, vivaj bufoj kaj serpentoj atendantaj aĉetontojn por la konsumado. Ne mankis ŝamanaj medicinaĵoj.

La lasta vespermanĝo estis pli festa kaj la adiaŭa programo okazis

denove en la halo de la Profesia Artkolegio kun bunta programo. Kelkaj elstaraj personoj ĉiam post la prezentitaj spektakloj persone dankis kaj manpremis kun la aktoroj.



**Dum la tuta semajno ni ĝuegis riĉan kulturenan programon kaj ĉinan afablecon.
Koran dankon al la organizantoj pro la etosoplana kongreso!**



KIEL UZI LA RAPORTON TEKNIKAJ INFORMOJ

MODE D'EMPLOI INFORMATIONS TECHNIQUES

Mi spertis ke kiam estas tro da bildoj oni riskas tedi la legantaron.

Pro tio, mi metis ligilojn por rekte aliri la partojn kiuj plej interesas.

Iuj paĝoj de la raporto estis fizike metitaj fine de la dokumento por facila sensekva aliro.

[ALKLAKU](#)

Mi plezure aldonos sur mia retejo pliajn dokumentojn : simple sendu ilin al mi

hubert.demeyere@gmail.com

Eblas elŝuti ĉi tiun raporton el la paĝaro de APE (franclingvaj paĝoj ĉar la esperantaj ne estas ĉiam ĝisdatigitaj):

www.esperanto-wallonie.be

Post elŝuto en via komputilo, vi ne plu bezonos interetan konektadon por konsulti ĝin.



J'ai constaté que quand il y a trop d'images, on risque de lasser le lecteur.

C'est pourquoi j'ai prévu des liens pour atteindre directement ce qui intéresse le plus.

Certaines pages du rapport ont été placées physiquement en fin du document pour faciliter l'accès séquentiel.

[CLIQUER ICI](#)

J'ajouterai avec plaisir sur mon site des documents supplémentaires : envoyer les à mon adresse :

On peut télécharger ce rapport du site de APE (informations au jour le jour):

Après le téléchargement dans votre ordinateur vous n'aurez plus besoin de connexion internet pour le consulter.

KIEL UZI LA RAPORTON TEKNIKAJ INFORMOJ




Per la ligiloj eblas facile aliri tion kio interesas vin.

*La **Home** klavo ebligas ĉiumomente atingi la supron de la dokumento.*

*La **End** klavo ebligas ĉiumomente atingi la malsupron de la dokumento.*

*La **PgDn** klavo ebligas konsulti la dokumentojn sinsekve.*

Ne ĉiuj klavaroj enhavas tiujn klavojn sed, preskaŭ ĉiuj proponas similajn funkciojn; ekzemple, per pluraj specoj da sagoj aŭ per fingro. Uzu la funkciojn de via sistemo

Por daŭrigi la paĝumadon kaj por ke la sistemo bone funkciu, uzu la taŭgajn informojn (ligilojn aŭ/kaj klavojn) provizitajn en la malsupro de la paĝoj.  Alklakante tiu sagoligilo oni reiras al la lumbildo de kie oni venas.

MODE D'EMPLOI INFORMATIONS TECHNIQUES




Au moyen des liens vous pouvez facilement atteindre ce qui vous intéresse.

*La touche **Home** permet à tout moment d'atteindre le début du document.*

*La touche **End** permet à tout moment d'atteindre la fin du document.*

*La touche **PgDn** permet de consulter le document en séquence.*

Tous les claviers ne comportent ces touches, mais presque tous offrent des fonctions similaires; par exemple, au moyen de flèches ou avec le doigt. Utilisez les fonctions de votre système

Pour continuer la pagination et pour que le système fonctionne bien, utilisez les informations appropriées (liens et / ou touches) prévues au bas des pages.  En cliquant sur ce lien, on retourne à la dia d'où l'on vient.



TEKNIKAĴO

1. Post tiu paĝo oni trovas pogranda bildoj en miniaturo sur iuj paĝoj. Por reveni al la vokanta paĝo, alklaku



2. Uzinstruoj estas ĉiam alireblaj per la ligo provizita sur la hejmpaĝo.

(Klavo Home aŭ simila)

TECHNIQUE

1. Après cette page on trouve en gros plan les images placées en miniature sur certaines pages. Pour revenir à la page appelante, cliquer sur



2. Le mode d'emploi est toujours accessible par le lien prévu sur la page d'accueil

(Touche Home ou similaire)

FINO DE LA DOKUMENTO

Sintezoj

Tiu ĉi dokumento estas ĉapitro de pli ampleksa raporto pri la vojaĝo al Ĉinio de la geedzoj Michèle kaj Hubert De Meyere-Villers

« Tri semajnoj en Ĉinio, ekde la 10a ĝis la 30a de Majo 2015 »

LA ĈAPITROJ

Sintezoj (ĉi tiu raporto)

Pekino

Kongreso IFEF67

Postkongreso

Persona programo

FIN DU DOCUMENT

Synthèses

Le présent document est un chapitre d'un reportage plus complet concernant le voyage en Chine des époux Michèle et Hubert De Meyere-Villers

« Trois semaines en Chine, du 10 au 30 mai 2015 »

LES CHAPITRES

Synthèses (ce rapport)

Pékin

Congrès IFEF67

Après congrès

Programme personnel

www.hubertdemeyere.com/2015_05_V8_CHINE.pdf